**AVE - Agado Per kaj Por Esperanto**
**por subteni daŭripovan evoluon: 2023-11**

UN lanĉis la 17 Celojn de Daurigebla Evoluo ghis 2030 (CDE/ en: sustainable development goals). Per Esperanto AVE subtenas ekologion kaj edukadon, kaj agadas Por-Esperanto cele al Verdpartia Movado AVE ne estas formala asocio; ni kunlaboras kun aliaj organizaĵoj ke donacintoj ricevos oficialan kvitancon.

**Agado evoluo-subtena de AVE -** Asocio de Verduloj Esperantistaj, kunlaboranta fakasocio de UEA pri Ekologio: ni subtenadas - kune kun aliaj subtenantoj kaj fondusoj - projektojn ĉefe en Tanzanio, Burundo kaj DR Kongo.

**„Mazingira“** (vilaĝaro Ketare/Marambeka en nord-okcidenta Tanzanio proksime de Bunda), surloke organizita de esperantisto Mramba Simba; kunlaboro kun AVE ekde 2006.
- operacioj de infanoj kriplitaj pro malario-vakcinado;
- lernej-kostoj por orfoj, por materialo kaj vestaĵo;
- agrikulturo, sunflora oleo, biogaso;
- putoj por trinkakvo, pluvakvo-lagetoj por bestoj ktp.;

**2024: - kolekti pluvon de lerneja tegmento;**
**- rearbarigo je monto Tsirin'gati, pagi gardiston.**
**Detaloj: verduloj.org/afriko.htm**
Laŭ Wangari Maathai arbaroj mildigas la klimaton, protektas la grundon, tenas grund-akvon kaj donas fruktojn por homoj, abeloj kaj diversaj bestoj.

**"Akvo por Kalima"** (60 mil da enloghantoj; kun Kakutya 130 mil ), provinco Maniema, D.R. Kongo:
- komence ni subtenis la agadon de esperantisto Etienne Katchelewa kiu studis agrikulturon dank al SBV en Goma, fondis kooperativon PIEADC, enkadre de tio: 2013 ni subtenis por materialo reaktivigi fiŝ-lagetojn; kaj kultivi legomojn.
http://rosejo.blogspot.dk/
Ĝis 2022 ni financis 6 partojn de Etienne "Akvo por Kalima", provizi trinkakvon por pliaj 23 mil homoj. Nun 45.000 homoj havas aliron al salubra trinkakvo ene de 250 m al 13 kvartalaj kranaroj.
Dank' al subteno de EZ-Kleinprojektefonds (de la germana registaro) AVE kolektis kvaronon de samideanoj kaj ankaŭ de laboristraj fondusoj de germanaj firmaoj (Bosch kaj Daimler).
Denove koran dankon al chiuj donacintoj.
La homoj pagas 5 cents por 20 l.
Dank' al tiu kolekto ili mem povis ripari tubon kiun rompis terglitaĵo je la monto Abuki.
**2023/24 ni kolektas 2000$ por la lasta kranaro.**

**Uvira**, Suda Kivuo, D.R.Kongo - Martin Fadhili Enzo:
- **rearbarigo:** bedaurinde homoj forhakadas arbojn por produkti ligno-karbon. Li konstruis pli-efikajn kuir-fornojn kiu reduktos la bezonon da ligno-karbo. Kune kun lernantoj li kultivas proksime de la lago Tanganjika diversajn fruktarbojn, kaj per agro-forstado de nutraĵoj evitas erozion. Li aĉetis kroman terenon, je strato N5 kaj planas konstrui domon por la laboro, kaj ankaŭ por renkontiĝoj de samideanoj.

**Societo de Bona Volo, Goma,** DR Kongo, subtenas lernantojn kaj iliajn familiojn (ofte vidvinoj). Penny Vos organizis kudrejon kiu kreas enspezon por la virinoj. Multaj lernantoj lernas ankau Esperanton.
**2024 AVE subtenas 19 gejunulojn:** kotizo por mez-lernejoj kaj universitatoj - kotizoj inter 150 kaj 600 $ - **ankoraŭ mankas 2500 $ por la 2a duono.**
SBV achetis propran terenon je deklivo kun lavo; tie konstruis simplan kabanon (ekz-e por studentoj de proksima altlernejo) parte por gajni enspezon. Pli granda domo sekvos. **Ni nun kolektas 4000 $** por konstrui necesejon, simplan barilon, noti en kadastro

Jen **por-Esperanto-**projekto kiu celas al edukado: **Esperanto-Centro Rumonge** (Burundo, ANEB) ek de 2010 posedas sufiĉe grandan konstruaĵon kun biblioteko kaj du klasĉambroj; ni jam subtenis acheti apudan terenon - necese pro ŝanĝita voj-plano. 2019 dank' al SEZ fonduso de germana lando Baden-Virtembergo – partner-lando kun Burundo - ili instalis infanĝardenon kie infanoj lernas siajn proprajn lingvojn kaj la francan, tiu estas la lingvo en lernejoj. La infanoj zorgas por pli da vivo en la Centro. Dungitoj de firmao Robert Bosch subtenis meblojn por 3 novaj klaschambroj kaj TV-on por infanoj kaj samideanoj: BAVELO-anoj (Eo en Ba-Vi) jare subtenas semajnan tagmanĝon kion petis gepatroj de infanoj. SEZ subtenis ekologian agro-forstadon. **Tie ili kultivas legomojn parte sub arboj.**

Ni subtenas samideanon Illias Boukari - je tago de sendependeco en **Niĝero** oni plantas arbojn.
Kaj ni subtenas studenton en **Madagaskaro.**

**Principe la studentoj devas repagi la subtenon** kiam ili finis la studadon kaj havas salajron. Tiel eblas daŭrigi la subtenon de samideanaj junuloj.

**Bonvolu subteni unu el tiu projektoj:**
Mazingira, Goma, Kalima, Uvira, Rumonge

AVE-kotizo: 10 €, se vi povas. UEA-membroj rajtas transpagi al nia **UEA-konto: avex-z** . Kiel EU-enloĝanto vi povas ricevi imposto-reduktantan kvitancon se vi donacas al Kalima aŭ Rumonge. (minimume 50 €). Alikaze al mia konto : M. Westermayer, Volksbank Freiburg, BIC : GENODE61FR1 IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11
Bonvolu noti: „AVE, Kongo/ Tanzanio/ Madagaskaro“

**Por Kalima:** al www.**direkthilfe-freiburg**.de
IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02
BIC: GENODE61FR1, Rimarko: „SBV, Kalima ...“
**Por Rumonge:** al BAVELO **-** www.esperanto-bw.de
IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22,
BIC: SOLADES1VSS , Bonvolu noti: „Rumonge ...“

**Koran Dankon !**

**Asocio de Verduloj Esperantistaj**
c/o Manfred Westermayer
Weißdornweg 68, DE-53177 Bonn
rete: manfred@westermayer.de
www.verduloj.org/afriko.htm ; verdularo.com